

Theodor Storm,
En la arbaro

tradukita de Manfredo Ratislavo

Ĉi tie ĉe l' deklivo
Mutiĝas nun la vent',
Kaj sidas sub la branĉoj
Infano en silent'.

En timian-odoro
Ŝi sidas sur la ter';
La bluj muŝoj zumas
Kaj brilas tra l' aer'.

Silentas la arbaro,
Rigardas saĝe ŝi,
Kaj ĉirkaŭ la harbukloj
Fluadas sun-radi'.

Kukolo ridas fore;
Pensigas io min:
Ŝi havas la okulojn
De la arbar-reĝin'.

*Traduko de la Germana poemo "Im Walde" de THEODOR STORM (Teodoro Stormo, *1817-09-14 - †1888-07-04) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04).*

Arg-172-344 (2004-02-22 11:32:56)